

SVISA ESPERANTO - SOCIETO

INFORMAS

1/93

Koresp-adr: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich

Red-Telefono: 01/381 77 13

Januaro-Februaro

SES-KOTIZOJ 1993, ALVOKO DE LA KASISTO

En tiu-ĉi eldono de SES INFORMAS vi trovas enpagilon por pagi vian kotizon. Ankaŭ donacoj estas ĉiam bonvenaj. Koran dankon.

Bonvolu nepre ĉiam indiki sur la enpagilo, kion vi pagas, ekz: "Kotizo por 1993, donaco ktp"!

MEMBRO-KOTIZOJ (inkluzivas abonon al LITERATURA FOIRO kaj SES INFORMAS):

- INFANOJ ĝis 18 jaroj	SFR. 5.-
- JUNULOJ ĝis 26 jaroj	30.-
- EMERITULOJ, PENSIULOJ	30.-
- GEEDZOJ EMERITAJ	45.-
- CETERAJ MEMBROJ	50.-
- GEEDZOJ	75.-
- ABONANTOJ sen membreco	30.-

Elkoran dankon al ĉiuj, kiuj pere de baldaŭa pago subtenas niajn klopodojn servi al vi.

Via kasisto: E. von May

ooOoo

GRUPAJ INFORMOJ

BELLINZONA:

13/14.2.1993 **KULTURA SEMAJNFINO:** Mi deziras dediĉi tiun-ĉi semajnfino al pripenso pri Wsperanto, nome pri la nova rolo (aŭ malrolo) de Esperanto en la nova Eŭropo. Mi - kaj ĉefe Teresita - organizos ĝin laŭ konata recepto. -TC-

ESPERANTO-SOCIETO BERN:

En restoracio AL FORNO Spitalgasse 37 Bern.
5.1.19.30h kaj 2.2.19.30h

LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO:

En hotelo SIMPLON Habsburgerstr. 16 Luzern.
21.1.20.30h "KOMPILADO DE NIA PROGRAMO 1993."
(ĵaŭdo) La antaŭa paroliga leciono ne okazos pro estrarkunsido.

ESPERANTOKLUBO WIL:

En restoracio Schweizerhof Unt. Bahnhofstr.18.
13.1.20.00h "VALENCIO" urbo de la Universala Kongreso de Esperanto, kun lumbildoj.
3.2.20.00h En la loĝejo de familio Pochanke, Lettenstrasse 70 WIL (tel: 073/22 68 30). "Babilado kaj impresoj de ISO (internacia seminario de germana junularo).

ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH:

11.1.19.00h MONATA KUNVENO en Karl der Grosse.
Jaz-konkurso kun klarigoj en Esperanto.
8.2.19.00h Ĝenerala kunveno en Karl der Grosse.

ooOoo

MORTANONCO

La 2-an de septembro 1992 mortis, 89-jara, Hans Noll, longjara membro de la Esperanto-Societo Zürich, de Svisa Esperanto-Societo, kiel ankaŭ de SAEF (1932-1992). En la jaroj 1952 ĝis 1972 li estis kasisto de SAEF. En ESZ li estis aktiva membro dum pli ol 50 jaroj. En la vicoj de ESZ, SES kaj SAEF li restos en bona rememoro.

-FL-

RAPORTO DE LA CENTRA KOMITATO Claude GACOND, prezidanto

Literatura Foiro & Svisa Esperanto-Societo informas

Ĉar la membraron de nia societo ni atingas ĉefe per niaj periodaĵoj **Literatura Foiro** kaj **Svisa Esperanto-Societo informas**, ni ne volas komenci tiun raporton sen unue danki al iliaj redaktoroj Perla MARTINELLI en Chiasso kaj Fritz LIECHTI en Zürich. Dum la jaro 1992 pri ilia laboro alvenis nur dank- kaj gratul-leteroj. Ambaŭ organoj kompletigas reciproke, kaj tion ŝatas iliaj ricevantoj.

Statuto

SES devus povi sisteme atentigi pri sia ekzisto la aŭtoritatojn federaciajn kaj kantonajn. Sed tiu kontaktado estas malfacila pro manko de nacilingvaj versioj de nia statuto. Tial la Centra Komitato ekentreprenis tiujn tradukojn. Andy KÜNZLI en Kriens jam submetis al la Centra Komitato germanan version de nia reviziita statuto, kaj estos verkataj franca kaj itala tradukoj. Antaŭ ol eldoni tiujn tri versiojn, ni devos verki statutan paragrafon, kiu atentigos, ke la teksto en esperanto estas sole decidiga, se la franca, germana aŭ itala tekstoj povus neatendite konduki al interpreta diverĝo. La tradukantoj konstatis kelkajn neprecizaĵojn kaj mankojn. Tial en 1993 la Estraro atente trastudos ĉiujn ŝanĝojn aŭ aldonojn, kiuj montriĝos necesaj, por povi ilin proponi al la Ĝenerala Kunveno en 1994. Kaj tuj post la koncerna voĉdono SES fine povos eldoni la antaŭviditan dokumenton.

Kunsidoj

La Estraro renkontiĝis en Olten la 10-an de oktobro kaj la Centra Komitato la 28-an de novembro 1992. La Estraro ankoraŭ renkontiĝos en Arth la 13-an de februaro.

Ekster tiuj kunvenoj la sekretario kaj la prezidanto renkontiĝis almenaŭ dekon da fojoj, ĉu en La Chaux-de-Fonds, ĉu en Lucerno.

Ĉar nun solviĝis bazaj organizaj problemoj, la rigardoj povas turniĝi al la estonteco. Preciziĝas agadoj informaj, esploraj kaj eldonaj. Claude GACOND en La Chaux-de-Fonds redaktas inform-libretojn. Lin helpas kompetentaj grafikisto kaj tradukantoj. Tiel samtempe povos aperi en 1993 versioj franca, germana kaj itala de tiu informiloj.

Andy KŪNZLI entreprenis du diversajn enketojn: unuflanke temis pri varbagado helpe de nacilingva demando (germana, franca kaj itala) sendita al pli ol mil personoj memorfiksita en la komputilo de SES/KCE. Due temis pri projekto de **Svisa Esperanto-Leksikono**. Ni dankas ĉiujn, kiuj jam respondis al tiu enketo. Pere de nia organo **SES informas** numero 1992-6 ĉiuj estis detale informitaj pri la kontentiga disvolviĝo de tiuj du agadoj.

Regionaj Kulturaj Semajnfinoj

Depost la Ĝenerala Kunveno de 1992 nur la romanda semajnfino okazis. Plensukcese ĝi denove pasis en Cully la 26-27-ajn de septembro. Christiane SIXTUS POT en Perly redaktis detalan raporton por **SES informas** pri tiu aranĝo dediĉita al la **Europa Komunumo**. Niajn dankojn iras al Nicole MARGOT en Lausanne kaj al ŝiaj kunlaborantoj pro la modela laboro.

Per la januara numero de **SES informas** vi estas invitataj al la tiĉina semajnfino okazonta la 13-14-ajn de februaro 1993 kaj al la alemana, kiu disvolviĝos en Lucerno la 13-14-ajn de marto. Tiu ĉi sekvos nian Ĝeneralan Kunvenon kaj festos la 90-an naskiĝjaron de SES. Ni esperas, ke multos la esperantistoj, kiuj partoprenos al tiuj aranĝoj.

Jam nun ni povas anonci, ke en 1993 la romanda semajnfino revenigos nin en Cully la 11-12-ajn de septembro.

Junularo Esperantista Svislanda

Monaton post monato ĉu pere de SES informas, ĉu rekte per la plaĉaspekta organo La Junaj Esperantistoj informas ni povis legi pri la progresoj kaj sukcesoj de la esperanto-junularo. Kaj dum la lucerna Svisa Esperanto-Kongreso ni iom intime konatiĝos kun ili, ĉar ili transprenos la respondecon de la vespera programo. Ni ĝojas, ke nia SES-jubileo renkontigos la junularon kun la SES-anoj, kiuj tendencas fariĝi maljunularo. Renoviĝo de la aĝpiramido je sia bazo estas ĝojiga demografia fenomeno por la svisa esperantistaro. Ni vigle gratulu kaj danku al la JES-prezidantino Marion GROSJEAN en Les Brenets kaj al ŝiaj kunlaborantoj. La renovigo de la SES-subvencio al JES konkretigu tiun dankemon de SES kaj nian esperon, ke en 1993 plue kreskos nombre kaj agade la "estonteco de la svisa esperantistaro". Ĝi kapablu organizi de tempo al tempo restadon por esperantistidoj, ke tiuj infanoj ankaŭ ekrigardu al esperanto pere de JES. Ili iel estas la estonteco de JES, kiel JES estas la estonteco de SES!

Kultura Centro Esperantista

En 1992 KCE reorganizis someran kaj semajnfinajn kursojn: Mireille GROSJEAN en Les Brenets, la KCE-prezidantino, kaj ŝiaj kunlaborantoj sciis, ke ĉiuj SES-anoj ĝojas, ke la domoj "Ernest Naville" kaj "Pierre Bovet" kaj ties kunvenejoj "Klara Zamenhof-Zilbernik" kaj "Andreo Cseh" realtiras esperantistojn. Nia espero estas, ke ne nur el foraj landoj oni veturu al La Chaux-de-Fonds por perfektigi en la praktiko de esperanto kaj por intimiĝi kun la kulturaj valoroj, kiujn ĝi alportas, sed ankaŭ el ĉiuj regionoj de Svislando. El Germanio oni tro malofte rigardas al La Chaux-de-Fonds. Kvankam Zŭrich estas ne pli fora ol Ĝenevo, ĉefe el okcidento venas partoprenantoj. Ĉu tio signifas, ke eĉ por la esperantistoj ekzistas "rösti"-limo? SES vigle anoncos la kursojn de KCE en ĉiu numero de SES informas, en la espero, ke el ĉiuj esperanto-grupoj oni ekorganizos grupajn veturojn al la kursoj de KCE.

Pluraj grupoj kun timo konstatas sian maljuniĝon. Ara partopreno al semajnfinaĵoj de KCE povas esti taŭga celo por loka kurso. Kaj stud-semajno en La Chaux-de-Fonds lasas ĉiam neforgeseblajn rememorojn. Grave estas, ke la esperanto-komencantoj ĉiuaj travivu kiel eble plej rapide kaj ofte renkontiĝojn kun alilingvanoj kaj kun esperanto-lertuloj el aliaj regionoj. Naskiĝu amikecoj trans la "rösti"limo.

Svisa ILEI-Sekcio

Tre pozitiva rezulto de la pedagogia aktiveco ĉe KCE estas la kresko de la membraro de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, kies svisan perantecon transprenis Nicole MARGOT. **Svisa ILEI-Sekcio** havas nun 19 anojn.

Rilatoj kun lernejoj

Ne estas nia rolo raporti pli longe pri la aktiveco de KCE kaj ILEI. Tamen ni sentas la bezonon atentigi, ke koncerne la esperanto-instruadon kaj la rilatojn kun la lernejoj aŭtoritatoj, ili estas kun la Estraro de SES la solaj realaj reprezentantoj de esperanto.

CDELI

Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia festos sian 25-an naskiĝjaron. Multaj partoprenu en La Chaux-de-Fonds la 30-an de januaro 1993 tiun jubileon, kiun sekvas kunsido de la **Federa Konsilio**. Ambaŭ manifestacioj konsciigos nin pri la graveco varti niajn arkivaĵojn, ĉar nur helpe de dokumentoj, kiujn ni kapablis konservi, la posteuloj povos havi ideon pri la ne ĉiam tre facila laboro, kiu plenumiĝas nelacigeble en niaj diversaj societoj kaj grupoj. Povu la jaro 1993 instigi ĉiujn svisajn esperanto-organizaĵojn ekzameni, kio estas la sorto de la propraj arkivaĵoj kaj ĉu ili estas ligitaj al CDELI per kunlabor-konvencio.

Ombro

Kiam la berlina muro disfalis, ni ĉiuj ĝojkriis. Sed tiam ni ne antaŭvidis, ke tiu disfalo ankaŭ signifos la malaperon de esperanto-elsendoj en kurtondaj radio-stacioj. Fakte tiuj radio-stacioj estis unu el la fruktoj de la "malvarma milito". Ilia rolo estis aŭdigi novaĵojn, kiujn diktaturaj reĝimoj provis silentigi aŭ deformi. Ekde kiam tiuj novaĵoj rekte aŭdiĝas el la regionaj radioj, grandparte disfalis la kaŭzo mem de la neceso de la kurtondaj radio-stacioj. La svisa devis draste redukti siajn elspezojn kaj celojn, kaj esperanto estas unu el la viktimoj de tiuj ŝparoj.

Objektivaj observantoj povis konstati jam ekde kelkaj jaroj, ke en Svisa Radio Internacia la emeritojn anstataŭis iom post iom nova homtipo. La fondintoj kaj unuaj funkciuloj de tiu radio estis idealistoj. Ili memoris pri la pioniraj jaroj, pri laborcirkonstancoj malfacilaj, pri la financaj kaj teknikaj problemoj. Sekvis periodo de eksterordinara riĉiĝo, kaj kun ĝi la konstruo de vera palaco, la multiĝo de laborpostenoj. Alvenis alitipaj funkciuloj luksemaj kaj neglektemaj pri ĉio minoritata aŭ pionira. Por ili nur la uson-angla mondo valoras. Nur malestimo kontraŭ esperanto estis atendebla de tiu novularo. La korespondstatistikoj parolis favore al esperanto. Sed per la argumento, ke la angla estas nun la sola mondlingvo, la zamenhofa idiomo estis elprogramita.

Nia malforto

Plian kaj pluan fojon montriĝas nia malforto. La esperantistaron ne ĉirkaŭas simpatiantoj, interalie honora komitato grupiganta altrangulojn, kiun ni povus help-alvoki, kiel faras aliaj kulturaj movadoj, kiam okazas maljustaj atakoj kontraŭ esperanto. Tio montras, ke ne nur novajn parolantojn ni devos surstrate varbi, sed ankaŭ apogontojn ni devos konvinki.

Alia malforto estas manko de kohero. Ni estas antaŭ ĉio aro da individuoj, kiuj individue pensas kaj agas. Pluraj projektoj estis dubindaj, ĉar la projektintoj agis en

soleco. Por la jaro 1992 ekzemplo de nekunordigita agado estis la lanĉo de telefona esperanto-numero por germanlingvanoj ("Infofono") fare de Dietrich WEIDMANN. La Estraro prave ne kritikis la ideon mem de la agado, sed ĝian realigon nekontentigan, kiu rezultas el laboro tro persona.

SES provas krei ligojn inter tiuj individuemuloj kaj inter la lokaj kaj fakaj organizaĵoj. Por pretigi dignan centjaran jubileon restas al ni nur dek jaroj. SES diskutigos projektojn fare de la Federa Konsilio kaj de laborgrupoj. Ni esperas, ke kiam ili konkretiĝos per precizaj agadoj, kiujn ni submetos al la Ĝenerala Kunveno de SES, ĉiuj esperantistoj en Svislando kapablos identiĝi kun ili. Esperanto-Tagon ni devus povi kunorganizi por konigi nin publike jaron post jaro. Pri tio kaj pri aliaj projektoj ni havos la okazon debati en la forumaj momentoj de la lucerna Svisa Esperanto-Kongreso je la 13-14-aj de marto. Ĉiuj havos la okazon esprimi siajn dezirojn, ideojn, agad-planojn. Sed ekago disvolviĝu poste en disciplino, kiun ĉiuj agnosku kaj respektu. Por ĉiu agemulo certe preciza tasko ekzistas.

Financaj rimedoj

Ĉiuj konstatis, ke la svisa mono tendencas perdi parton de sia valoro. Dum la pasintaj jaroj enorme altiĝis la poŝtaj tarifoj. Ankaŭ la eldonkostoj konstante kreskas. Tial la Centra Komitato decidis proponi plialtigon de la kotizoj por la jaro 1994. Por la jaro 1993 la kotizo restos senŝanĝa, kaj ni esperas, ke ĉiuj pozitive respondos al la alvoko de la kasisto tuj utiligante la enpagilon, kiu akompanas la januaran numeron de **SES informas**. Ni antaŭdankas ĉiujn, kiuj aldonos donaceton. Kaj ni dankas ĉiujn, kiuj faris donacon dum la jaro 1992. Bonvolo ne sufiĉas, kiam mono mankas.

La plej malbona novaĵo de la jaro

ESPERANTO ĈE SVISA RADIO INTERNACIA ESTAS
DEFINTIVE LIKVIDITA

Tiuj ĉi linioj informas vin pri la bedaŭrinda decido de Svisa Radio Internacia (Bern, Svislando) definitive nuligi ĝian esperanto-programon.

La kaŭzojn de la malapero de la E-programo ĉe SRI plej bone klarigas du leteroj el la direkcio de SRI mem. Samtempe ili respegulas la aktualan vidpunkton de tiu radiostacio vidalvide de la hodiaŭa pozicio de esperanto.

La unua letero de SRI-direktoro Roy Oppenheim al la redaktoroj de la esperanto-programo, Claude Gacond kaj Andy Künzli, oficiale anoncas la finon de la 46-jara historio de esperanto ĉe SRI:

Svisa Radio Internacia, Bern, Svislando
Roy Oppenheim, direktoro

Bern, la 30an de oktobro 1992

Tre estimataj sinjoroj Gacond kaj Künzli,

Kiel interkonsentite komence de la jaro, ni detale ekzamenis la demandon de eventuala daŭrigo de la esperanto-programo sur la bazo de kasedoservo. Post analizo de ĉiuj disponeblaj decidoelementoj ni nun konkludis, ke la intereso pri esperanto-programoj el Svislando ne sufiĉas por la konservo de specifa SRI-oferto.

La spontanaj reagoj al la ĉesigo de niaj kurtondaj disaŭdigoj en esperanto jes estis sufiĉe multnombraj, sed staras niaopinie en sufiĉe malfavora rilato al la de diversaj esperanto-organizaĵoj anoncita intensa intereso pri tiaj elsendoj.

La reagoj al niaj enketoj ja atestas ĝeneralan bedaŭron, sed neniel pruvas veran bezonon por esperanto-programoj. Krom tio, la plimultaj reagoj venis el landoj, por kiuj ni ĉiukaze neniam ĉefe laboris en esperanto. Entute ni trovis malpli ol 100 personojn, esperanto-organizaĵojn kaj radiostaciojn kun specifa intereso pri kasedoservo.

Kiel vi scias, SRI transformis siajn programojn surbaze de novaj prioritatoj. Tiuj prioritatoj nuntempe validas des pli, ĉar la limigo de la financa kontribuo de la /svisa/konfederacio ne plu permesas agadojn, kiuj ne estas direktitaj klare al la plej gravaj celpublikoj.

Per tio la historio de esperanto ĉe SRI estas finita. Por ni ĝi estis tempo de konstruiva agado en la intereso de la internacia interkompreno. Ke ni povis kalkuli ankaŭ pri la engaĝita kunlaboro de la svisaj esperanto-medioj, sendube kontribuis al la granda sukceso de tiuj elsendoj. Ĉiokaze ni ŝatus danki ankaŭ al vi pro via aktiveco.

Kun afablaj salutoj

La direktoro
Roy Oppenheim

En letero direktita al SRI kaj publikigita en 'Svisa Esperanto-Societo informas', n-ro 6/1992, Fritz Liehti (vicprezidanto de Svisa Esperanto-Societo kaj redaktoro de 'SES informas') alvokis la direkcion de SRI modifi la decidon je forigo de la E-programo. Walter Fankhauser,

marketingestro de SRI, pli konkrete malkovras la veran fonon de la rezigno pri la E-programo:

Svisa Radio Internacia, Bern, Svislando

Bern, la 2an de novembro 1992

Tre estimata sinjoro Liechti,

Ni ricevis vian leteron kaj la artikolon en la bulteno de via societo kaj legis ĝin kun granda intereso. Rilate la reenkondukon de la esperanto-elsendoj ni havas plenan komprenon por viaj argumentoj, sed ni ne ŝanĝos nian decidon.

Nur post profunda pripenso ni decidis pri la ĉesigo. La financaj kriterioj ludis ĉe tio nur subordigitan rolon. Multe pli gravaj estis la klaraj celkonscio al la deziroj kaj interesoj de la plej grava celpubliko kaj al la estontorientita graveco de la elsendolingvoj.

La sekvo de la nova alstrebo al la plej grava celpubliko estis, ke ni hodiaŭ ofertas du diversajn kurtondajn programojn: unu por svisoj en eksterlando kaj unu por internacia publiko. Por la internacia aŭskultantaro ĉiu sendbloko entenas po 2x15 min. en angla kaj franca, kaj po 15 min. en germana kaj itala lingvoj. Al la svisoj estas je dispono por 15 min. en germana, franca kaj itala lingvoj. Elsendataj estas la araba programo en aparta elsendobloko, kaj la hispana (nur por Latinameriko) paralele al la franca programo.

Se vi atente legas nian programaron vi konstatas, ke la hodiaŭa interkontinenta elsendostrukturo ne permesas konsideri pliajn (aldonajn) lingvojn, krom se ni dissplitigus la jam sen tio koncizajn elsendorimedojn kaj

per tio senteble malutilus al prioritataj celgrupoj.

Koncerne la forfalon de la esperanto-elsendoj en la eùropa programo la argumento ne estas ĉe la elsendostrukturo, sed ĉe la signifo de esperanto mem. La prioritataj celregionoj de la esperanto-elsendoj de SRI estis tute klare Orienteùropo kaj eksa USSR.

Ni estas konvinkitaj, ke per tiuj elsendoj dum la pasintaj jardekoj ni plenumis gravan kontribuon al la internacia kompreniĝo, kaj ni dankas al la svisaj esperantistoj pro la multvalora subteno.

Per la malfermiĝo de oriento principe ĉio ŝanĝiĝis. estas vere, ke ankoraŭ por longa tempo ne ĉiuj problemoj de interkompreniĝo estas solvitaj; sed oni ne povas ignori la fakton, ke hodiaŭ la angla, germana kaj franca lingvoj estas sur la vojo forpuŝi esperanton en ĝia origina rolo. Aldoniĝas, ke hodiaŭ partnerecoj kun la amaskomunikiloj en oriento pli gravas, ol la tradiciaj ofertoj de la internacia kurtonda radio. Tial ni investas rimarkindajn rimedojn en la rektan kunlaboradon kun ĵurnalistoj el Polio, Hungario, Bulgario, ktp.

Finfine ni volus atentigi, ke post la ĉesigo de la esperanto-elsendoj ni ofertis kasedoservon al multnombraj aŭskultantoj, esperanto-organizaĵoj kaj radiostacioj. Intertempe montriĝis nur tre modesta nombro da interesuloj kaj tial ni, antaŭ kelkaj tagoj, decidis plene rezigni ankaŭ pri tiu ĉi kompromiso.

Ni dankas al vi pro via kompreno kaj volonte esperas, ke vi prezentos niajn argumentojn ankaŭ al la legantoj de via bulteno.

Kun afablaj salutoj

Walter Fankhauser
estro de PR-marketingo

Rimarkoj de A. Künzli:

La supra komuniko signifas grandan baton por la esperanto-ĵurnalismo kaj -movado entute.

Por savi la E-programon ĉe SRI, krom ampleksaj raportoj de la redaktoroj de la esperanto-elsendoj de SRI, C. Gacond kaj A. Künzli, al la direkcio de SRI, kaj kunsidoj kun ĝiaj funkciuloj, estis faritaj kelkaj publikaj alvokoj:

1) Februare aperis en 'Esperanto' kaj 'Internacia Ĵurnalisto' (ankaŭ en 'SES informas', 3/92) longa artikolo, kiu provis klarigi la malfacilan situacion de la esperanto-programo de SRI kaj instigi la esperantistaron adekvate reagi.

2) Al la februaraj radioalvokoj amase reagi kaj eviti la malaperon de la esperanto-programo, ĝis septembro respondis ĉ. 250 aŭskultantoj de SRI, kiuj petis la daŭrigon de la esperanto-programo.

3) Post aprila cirkulero de Svisa Esperanto-Societo al ĉiuj Landaj Asocioj de UEA (kaj aliaj organizaĵoj) kun alvoko peti de SRI rezigni pri la ĉesigo de la esperanto-elsendoj el Berno, respondis organizaĵoj nur el Aŭstralio, Danlando, Germanio, Finnlando, Francio, Grekio, Hindio, Israelo, Italio, Norvegio, Portugalio, Singapuro, UEA (Durwael), SAT, k.a. Ili trafe defendis la intereson de esperanto.

4) En majo SRI dissendis al ĉ. 1000 adresoj de laŭdire esperanto-aŭskultantoj kaj alia interesularo ampleksan enketilon, per kiu oni povis marki konkretajn temojn, pri kiuj oni ŝatus aŭdi estonte (sur kasedoj). Resendis la enketilon plenigitan ne pli ol 40 interesuloj!!

5) Dum la 77a UK en Vieno estis redaktita Radio-rezolucio kiel tria kongresa rezolucio favore al la esperanto-disaŭdigoj en la mondo. Gi estis tradukita en la germanan lingvon kaj sendita al SRI.

Por la SRI-direkcio la menciitaj reagoj estis tro malmultaj kaj ne pravigis daŭrigon de la E-programo. Tial SRI decidis tute fini sian E-ĉapitron.

Tiuloke estu dankate al ĉiuj, kiuj komprenis la minacon

kontraŭ esperanto kaj kiuj reagis cele al la konservo de la E-programo de SRI.

Komparu ankaŭ la parton pri SRI en la Jarraporto de la CK de SES kaj la historian skizon pri la esperanto-programo de SRI, kiu aperos en la venonta 'SES informas'.

oOo

INFANA SEMAJNFINO EN BRITIO 12-a - 14-a de marto 1993.

Ni invitas viajn infanojn al IPSWICH en orienta parto de Britio por semajnfino plena de amuzo kaj lernado.

Nur por infanoj kun ioma scio de Esperanto!

Ni ne instruos komencantojn!

Preferataj aĝoj 7 ĝis 15... proksimume.

Oni ekskursos, kantos, pentros kaj babilos en granda komuna domo.

Kaj la kosto al alilandaj vizitantoj ????????????????

(NENIOM krom la alveturo!!!)

Gvidantoj de vizitantoj devos pagi tre moderan sumon, kompreneble.

Venos grupo el Nederlando kaj pluraj el diversaj partoj de Britio.

Venu ankaŭ vialandaj infanoj, **NEPRE!!**

A l i ĝ u f r u e !

Skribu al:

Anne Morse Brown
Mill Lane Farmhouse
Mill Lane
Wombourne Britio
WV5 OLE

Telefonu:
(Britio)
0902 893683

Jen la dua evento en Britio nur por infanoj

ooOoo

REGIONA KULTURA SEMAJNFINO DE SES

La regiona kultura semajnfino de SES okazis en Cully, mirinda urbeto, de la 26-a ĝis la 27-a de septembro. Temo: **EŬROPA KOMUNUMO.**

Nicole Margot kaj Jacqueline Vasserot akceptis la partoprenantojn (ĉirkaŭ 30) en la hotelo "Major Davel", kiu kuŝas apud la lago en bela parko. La tre efika organizo kaj la intereseĝa temo promesis al ni agrablajn tagojn. Tio efektiviĝis.

La libroservo ekfunkciis je la 14.00h. Por mi estas alloga loko kaj ŝajnas ne nur por mi. Je la 15.00h Jacqueline malfermis la kunvenon per kelkaj bonvendeziroj.

Kiam Nicole estis indikinta praktikajn aferojn, tri grupoj formiĝis: grupo A/prelego, grupo B/konversacia rondo kaj grupo C/komentoj. Andreas Bickel gvidis grupon B kaj Lucienne Dovat grupon C. Ili laboris en proksima lernejo. Grupo A hotele aŭskultis prelegon de s-ro Angelo Tsirimokos pri Eŭropa Komunumo (EK). Tiun-ĉi lastan rondon mi partoprenis.

La temo estas vasta, iom komplika kaj ampleksa. S-ro Tsirimokos skizis al ni la disvastiĝon de EK ekde 1950 ĝis nun. Estas rimarinde, ke jam 5 jarojn post la dua mondmilito fariĝis io konkreta: Deklaro de Robert Schuman (aŭtoro de eŭropa komunuma plano pri karbo kaj ŝtalo).

De tiam, paŝon post paŝo, diskutadojn post diskutadoj, traktojn post traktoj stariĝis EK nun konata. Se pluraj problemoj estis jam solvitaj, restas tamen multaj aliaj, kun kiuj oni devas akordiĝi. Ekzemple: agrikulturo, libera cirkulado de laborfortoj; socia, regiona, transporta, media (natura) politikoj ktp.

Gravas ankaŭ estigi eŭropan senton inter la

Ŝtatoj, registaroj kaj civitanoj el ĉiuj koncernataj landoj.

Dum paŭzoj ni babiladis agrable pri Eŭropo (ankoraŭ!) kaj aliaj temoj, aŭ aerumis en la bela parko. Mi, kiel ĉiam, ĝuis la esperantistan etoson.

Post bongusta vespermanĝo ni ĉiuj ludis en la lernejo. Mireille Grosjean pretigis kaj kondukis seriozan, interesan, sed tamen amuzan ludon, kiu permesis pli bone kompreni la malfacilon adaptiĝi al nova vivmaniero. Ni travivis kulturŝokojn.

Nokte ventego leviĝis sed dimanĉon matene la vetero estis agrabla, nur venteto blovis. Post matenmanĝo ni kunvenis por lerni aŭ aŭskulti prelegon de s-ro Brian Moon. Li parolis pri lingvoj en EK, li do konas la temon. Nuntempe 9 oficialaj lingvoj egalrajtaj estas uzataj. Estas la franca, angla, germana, nederlanda, itala, hispana (kastilia), portugala, dana kaj greka. (Multlingvismo). Ŝajnas, ke la franca kaj la angla estas la ĉefaj, sed ĉiu rajtas paroli sian lingvon. La kompletaj raportoj estas tradukitaj en la naŭ lingvojn. La tradukservo (TS) kalkulas 7 fakojn, en kiuj fakistoj tradukas la raportojn en la 9 lingvojn. Proksimume 2000 tradukistoj kaj interpretistoj laboras en la TS.

Esperanto ne estas rekte proponebbla kiel plibonigo, ĉar la oficistoj en EK scipovas almenaŭ, krom la nacian, la francan kaj la anglan lingvon. Do ili havas nenian lingvan problemon.

Resume mi pensas, ke se oni observas problemon sub ĉiuj anguloj, aperas, ke ne estas tiel simpla solvi ĝin, kiel oni antaŭpensis.

Post bona tagmanĝo la partoprenantoj iom post iom disiĝis kaj kunprenis ne nur paperblokon kaj skribilon donacitajn de laŭzana societo (dankon!) sed ankaŭ belajn kaj interesajn memoraĵojn el tiu semajnfino.

-Christiane Sixtus-Pot-

LUCERNO
HOTELO STEGHOF (Voltastrasse 2)

SVISA ESPERANTO-KONGRESO
13-an kaj 14-an de marto 1993

kaj

ĜENERALA KUNVENO
DE SVISA ESPERANTO-SOCIETO
13-an de marto 1993

La membroj de SES kaj ĉiuj interesatoj pri la esperanto-vivo en Svislando estas kunvokitaj al la Ĝenerala Kunveno de SES, kiu okazos la sabaton 13-an de marto en Lucerno malferme al semajnfina **Svisa Esperanto-kongreso**.

10h00: Kafumo, renkontiĝaj babiladoj kaj libroservo, standoj, fakaj kunvenoj inter kiuj tiu de SAEF.

11h15 precize: **Malfermo de la Ĝenerala Kunveno de SES**

Tagordo:

a) **Protokolo de la antaŭa Ĝenerala Kunveno** aperinta en SES informas 3/92 (majo-junio).

b) **Raporto de la Centra Komitato** aperinta en SES informas 1/93 (januaro-februaro).

c) **Financa raporto** aperinta en SES informas 2/93 (marto-aprilo).

d) **Raporto de la kaskontrolantoj** aperinta en SES informas 2/93 (marto-aprilo).

e) **Buĝeto por la jaro 1993 kaj kotizoj por la jaro 1994.**

f) **Proponoj** (Ili alvenu ĉe la sekretario ĝis la 13-a de januaro 1993.)

g) **Diversaĵoj.**

12h45: **Komuna tagmanĝo** (bonvolu vin antaŭanonci per la aliĝilo al la Svisa Esperanto-Kongreso aldonita al SES informas 93/1).

15h00: **Malfermo de la kultura semajfino.**

Paralele al la prelega kaj foruma programo dediĉota al la festado de la 90-a naskiĝjaro de SES okazos kursoj por komencantoj kaj por progresantoj.

15h30-16h30: Rigardo al nia pasinteco kun Andy KÜNZLI.

16h30-17h00: Teumo.

17h00-18h00: Forumo pri la temo "Rigardo al la nuno": Kio estas kontentiga kaj kio ne estas kontentiga en la hodiaŭa situacio. Mallongaj kontribuoj kaj diskutoj.

18h30: Komuna vespermanĝo.

20h30-22h00: **Komuna vespero kun skeĉoj, muziko, lumbildoj, ludoj, ktp,** pretigita de 9 membroj de JES (Junulara Esperanta Societo): Michela BERNASCONI en Bellinzona, Eva CARLEVARO en Bellinzona, Benjamin CHABOUDEZ en La Chaux-de-Fonds, Rolf ERNST en Zürich, Marion GROSJEAN en Les Brenets, Francisco OCHOA en Bern, David kaj Vera POCHANKE en Wil, Fabrizio PORETTI en Bern.

Dimanĉa programo

Ekde la 8h00: Matenmanĝo

9h00-10h00: Libroservo kaj fakaj kunsidoj.

10h00: Daŭrigo de la forumo kaj de la kursoj. Rigardo al la estonteco: **Al ja jaro 2003: la 100-jara jubileo de SES kaj de la esperantiĝo de Edmond PRIVAT kaj Hector HODLER.**

12h30: Komuna tagmanĝo.

14h30-15h00: Ferma parolado fare de la prezidanto.

En la vivo de ĉiu societo estas privilegiaj momentoj. Tiu ĉi **Svisa Esperanto-Kongreso, kiu festos la 90-an naskiĝjaron de SES** tutcerte estos unu el ili. En dinamisma etoso ĝi renkontigos la plenkreskularon kun la junularo. Forumaj diskutoj paroligos ĉiujn. Standoj vekos intereson por libroj, gazetoj kaj fakaj aktivecoj.

Nepre partoprenu tiun renkontiĝon kaj venu al ĝi karavane el plej diversaj lokoj kun amikoj dezirantaj lerni esperanton, kun kursanoj kaj familianoj.

REZOLUCIO DE GERMANA ESPERANTO-ASOCIO

okaze de la kontraŭeksterlandaj atakoj dum la lastaj monatoj en Germanio.

Germana Esperanto-Asocio, kiel reprezentanto de civitana kaj kultura movado aktivanta de pli ol 100 jaroj por kompreno kaj paco inter homoj de malsamaj naciecoj, eksterordinare indignas pri la aktuala ondo de perforto kontraŭ eksterlandanoj en Germanio. Kun abomeno kaj hororo ni vidas, ke ŝovinismo kaj rasismo en blinde furioza malamo disvastiĝas kaj danĝerigas nian demokration. Kiu hodiaŭ silente rigardas, kiam oni batas fremdulojn, morgaŭ devos rigardi, kiel oni bruligas librojn kaj kiel postmorgaŭ oni murdos tutajn grupojn el la popolo. La pretendo, ke Germanio "ne estas lando malamika al eksterlandanoj", fariĝas nuda ciniko.

Germana Esperanto-Asocio tial postulas:

- efikan protekton kontraŭ atakoj al korpo kaj vivo de homoj, kaj energian agadon de polico kaj justico kontraŭ la obstinaj perfortuloj;
- ampleksan dialogon inter socio kaj politiko sur ĉiuj niveloj, por venki la estiĝintan fremdiĝon kaj por serĉi eventualajn solvojn por la realaj problemoj kun konsidero de ties kaŭzoj;
- solidaran kaj aktivan pledon de ĉiuj demokratoj en "reto da solidareco" kontraŭ la terorismo de la politikaj dekstruloj, per tio ke pli ol ĝis nun ni faru la valorojn de demokratio, libero kaj homaj rajtoj bazo de nia identiĝo kun nia respubliko, tiamaniere malfortigante la naciisman elementon. Kiu nomas sin germano, devas aktive pledi por tiuj valoroj, pri kiuj ni devus fieri de 40 jaroj. Ĉiu, kiu tiel piedpremas niajn valorojn, metas sin kontraŭ nia socio kaj devas porti la konsekvencojn antaŭvideblajn en konstitucie

jura ŝtato.

Al niaj samlandanoj kaj al niaj amikoj en la tuta mondo ni diras: Tion-ĉi ni ne toleras! Ne eblas senkulpiĝi tiajn fiagojn. Ni apelas al niaj membroj kaj al ĉiuj Esperanto-amikoj, ke ili kun ankoraŭ pli da civila kuraĝo ol ĝis nun aktivu por la protekto de homoj senkulpe minacataj.

En Mainz, la 4-an de oktobro 1992
La estraro de Germana Esperanto-Asocio

oOo

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA INFORMAS

La teamo de Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds pretigis interesan programon por la tuta jaro 1993. La enhavo jam pretas kaj estas presata dum decembro. En januaro ĉiuj SES-membroj ricevos unu ekzempleron. Vi povas jam nun mendi kelkajn por sendi al viaj plum-amikoj tra la tuta mondo. Skribu al KCE, poŝtfako 779, CH-2300 La Chaux-de-Fonds.

Sciu, ke okazos studsemajnfino ĉiam dum la lasta semajnfino de ĉiu monato.

Plue okazos seminarioj kaj lingvokursoj dum julio kaj aŭgusto. Vi povos tie ekzameniĝi aŭ pri lingvokapablo, aŭ pri instrukapablo (internaciaj ekzamenoj de UEA-ILEI). -MG-

oOo

ADRES-ŜANĜO

La estrino de la KCE-libroservo havas novan adreson:
Sinjorino Nicole Margot, ch. des Lys 4
CH-1010 Lausanne (tel: 021/653 14 67)

oOo

ESPERANTO - CENTRO


de Slovakia Esperanto-Asocio prezentas sin.

Ni estas la loko, kie vi povas laŭdezire trovi
r i p o z o n - a m u z o n - i n s t r u o n .

Tio estas la Esperanto-Centro de SEA.

Ni ĉiujare preparadas, laŭ konkreta mendo, diversajn turismajn aranĝojn, eĉ altmontaran turismon.

Unu el la plej allogaj turismaj lokoj en Slovakio, sub kies montoj troviĝas ankaŭ nia Esperanto-Centro, sendube estas la mondkonata grandmontaro ALTAJ TATROJ. Ĝi estas ne nur vintra (pro sia skiparadizo), sed ankaŭ somera kaj fakte tutjara rezervejo de bona areo por turistoj kaj naturamikoj.



Panoramo de ALTAJ TATROJ - perlo de Slovakia naturo.

Adreso de la Centro:

Esperanto-Centro de SEA, Sobotské nam. 6
CS-058 01, CSFR

KCE KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

FINMONATAJ STUD-SEMAJNFINOJ EN 1993

Kultura Centro Esperantista (KCE) ofertas krom la tradiciaj semajnaj staĝoj ankaŭ buntan semajnfinan programon por la jaro 1993, kiu ebligas laŭplaĉan kaj flekseblan partoprenon. La aranĝoj okazas samtempe kaj paralele en formo de kursoj A, B kaj C. La kursoj okazas fine de ĉiu monato kaj strukturiĝas jene:

Datoj: januaro 30/31; februaro 27/28; marto 27/28; aprilo 24/25; majo 29-31; junio 26/27, julio 24/25; aŭgusto 28/29; septembro 25/26; oktobro 30/31; novembro 27/28; decembro 25-januaro 02.

Kurso A: por komencantoj

Enkonduko en la lingvon Esperanto kun klarigoj pri la Esperanto-movado.

Instruas: Sonja Brun, Jean-Jacques Lavanchy, Andres Bickel, k.a.

Kurso B: por progresintoj

Por partoprenantoj, kiuj komencis lerni Esperanton kaj kiuj ŝatus progresi en ĝi, aŭde, lege kaj parole. Oni faras gramatikajn kaj strukturŝanĝajn ekzercojn, legas facilajn tekstojn kaj konversacietas. Kaj la instruisto pretas respondi al ĉiuj viaj lingvaj demandoj.

Instruas: Mireille Grosjean, Claude Gacond, Andy Künzli, k.a.

Por kursoj A kaj B bv. peti detalan informon ĉe KCE.

Kurso C: por lertuloj

Por partoprenantoj, kiuj jam bone konas la lingvon

Esperanto, t.e. kiuj precipe povas sufiĉe bone kompreni ĝin aŭde. Kutime tiu ĉi kurso proponas konkretan temon, priesperantan aŭ ne-priesperantan, en formo de interesa prelego kun aldona diskuto.

1993 januaro 30/31

Herbert MAYER, (Aŭstrio): La eldonejo 'Pro Esperanto' (Vieno) - ĝiaj agadoj, verkoj kaj aŭtoroj.

1993 februaro 27/28

François DEGOUL (Francio): Homaranismo - la idealo de Zamenhof.

1993 marto 27/28

Claude GACOND (Svislando): Tra la Esperanto-literaturo per specimenaĵoj: verkistaj kaj tempaj karakterizoj.

1993 aprilo 24/25

Tazio CARLEVARO (Svislando): Interlingua kaj naturalismo en planlingvo.

1993 majo 29-31

Luigi BARBANA (Italio): En arbaro kun arbaristo. Akompane de Claude GACOND (Svislando).

1993 junio 26/27

Claude PIRON (Svislando): temo anoncota.

1993 julio 24/25

Tomasz CHMIELIK (Pollando). Edmond Privat, fama svisa ĵurnalisto kaj esperantisto. Lia defenda agado favore al etnoj, interalie la poloj.

1993 aŭgusto 28/29

Seminario: Edukado al pacaj rilatoj interkulturaj kaj interpopola konduto.

Gvidas: Mireille GROSJEAN (Svislando).

1993 septembro 25/26

Giorgio SILFER (Svislando): Pentagramo verde strekita
- la muzika flanko de la Esperanto-kulturo en la lasta jardeko.

1993 oktobro 30/31

Diskutforumo: Esperanto hodiaŭ. Kaj plue ?
Gvidas: Andy KUNZLI (Svislando).

1993 novembro 27/28

Claude GACOND (Svislando): La historio de Esperanto:
ĉu sinsekvo da debatoj lingvaj kaj ideaj?

1993 decembro 25 - 1994 januaro 02

Estas antaŭvidita programo kun festa, distra kaj prelega karaktero. Eblas ekpartopreni en ĝi iam ajn dum tiu periodo.

Por la sabataj vesperoj estas antaŭvidita kultura aŭ distra programo.

La detala programo de la kursoj C estos prezentata en
MONATA CIRKULERO de KCE

Por pliaj informoj bv. turniĝi al KCE.

Allogaj kaj unikaj kursoj - malaltaj prezoj

Tial: VENU AL KCE EN LA CHAUX-DE-FONDS !

Adreso: Kultura Centro Esperantista
Postiers 27 Case postale 779
CH-2301 LA CHAUX-DE-FONDS
Tel. 039 26 74 07

ooOoo

REDAKTFINO de SES INFORMAS n-ro 2/1993 esras
la 15-a de februaro 1993.

ooOoo